

Flandra Esperantisto - Sep. 1937

Notu do la daton : 18-19 Sept. : tiujn tagojn jam de nun ne plu estas liberaj por aliaj okupoj.

Bonvolu skribi tuj, ĉar urgas al la Sekretariejo de la Grupo : Stefaniestr., 44, Antverpeno.

Leuven - Grava Esperanto-Ekspozicio

Kiel preparo al la kurso kiu komencos en Oktobro sekvonta, la lovena sekcio « La Nova Tagiĝo », aranĝos Esperanto-Ekspozicion. Tiu Ekspozicio estos unu el la plej gravaj kiuj jam okazis ĉe ni. La Lovena Urbeŝtaro ĝis nun jam ĉiam montris sian intereson al Esperanto: ĝi nun donis plej grandan probon. Ĝi nome *senpage* disponigis al ni la grandan suban salonon de la Akademio de Belaj Artoj plej grava, ĝi troviĝas survoje de la kermeso-placo kiu ĵus tiam okazas.

La Ekspozicio okazos

DE LA 18-AN ĜIS LA 20-AN DE SEPTEMBRO.

Sed tio ne estas la nura intereso de la ekspozicio ! En la ejo de la Ekspozicio funkcios SPECIALA POSTOFICEJO. Ĉiuj poŝt-sendadoj poŝtitaj en la speciala leterkesto estos ŝtampitaj per speciala ŝtampilo tekstante: « Leuven — (dato) — Ekspozicio de Esperanto ». Ĉiu komprenos kiel grava tio-ĉio estas por la propagando en nia lasta kongres-urbo.

La organiza Komitato, por kontraŭigi la elspezojn de propagando ktp., decidis eldoni du specialajn poŝtkartojn. Ili estos frankitaj per poŝtmarko de 0,35 fr. kaj estos ŝtampitaj per la speciala ŝtampilo. La prezo estas 1 fr. po karto. La unua karto estos nur liverita al tiuj kiuj mendos ĝin antaŭ la 14-an de Septembro la dua estos ricevebla en la ekspozicio, sed estos ankaŭ aĉetebla per antaŭa mendo. Ĉiu Esperantisto nature ŝatos posedi tiujn du kartojn kiuj montras la oficialan intereson por Esperanto : Ili do mendu la kartojn, kun antaŭpago, al la sekretario de la grupo : Lode Cnops, Broekstraat, 21, Heverlee.

Venu multnombre al Leuven por viziti la Ekspozicion!

LEUVEN - EKSPOZICIO DE
ESPERANTO



18-19-20 DE SEPTEMBRO 1937
PALACO DE BELAJ ARTOJ
EKSPOZICIO ORGANIZITA DE
« LA NOVA TAGIĜO »

SEKCIO DE FLANDRA LIĜO ESPERANTISTA

16050/50-